# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)
TTT-ejo:

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

**Jar-kotizoj**: Normala: 30 ∈. Speciala: 15 ∈. Familia: 45 ∈.
**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**JANUARO/FEBRUARO 2011** **Nro. 86 (1/11)**



Kiel anoncite, la sabaton 18-an de decembro, ni renkontiĝis por celebri la tradician Z-tagon. Sur la foto, parto de la partoprenantoj.

**LOKE ...**

## Eĉ Mafalda parolas Esperanton.




Danke al la streboj de niaj amikoj Katixa kaj Santi, en la informilo “Barriketan”, de la gepatra asocio de la bilbao-a lernejo de Atxuri, ene de la ĉi-supra simpatia afiŝeto, ankaŭ videblas Esperanto.

## Nia sociaro.

Je la fino de 2010, nia E-Grupo nombris 60 anojn. Dum 2010, aliĝis neniu kaj eksis du: Pablo Díaz-Guardamino (eksiĝis propravole) kaj Miriam Lecanda (mortis).

Feliĉe, je la komenco de 2011, kiel sekvo de lasta kurso, jam du novaj esperantistoj aliĝis al la Grupo.

## Cuotas para el año 2011.

Tal y como se acordó en la última Asamblea General, las cuotas de socio, para el año 2011, han sufrido variación. Serán las siguientes:

| | |
|---|---|
| Cuota normal: | 30,00 euros anuales. |
| Cuota reducida: | 15,00 euros anuales. |
| Cuota familiar: | 45,00 euros anuales. |

El aumento, como ya informamos, se debe a los gastos que deberá afrontar el Grupo por la instalación de un ascensor en el inmueble. Aun no han comenzado las obras pero esperamos que esto ocurra de un momento a otro.

## Vizito de Miguel Fernández al Vitoria-Gasteiz.

Miguel Fernández Martín (http://esperanto.net/literaturo/autor/fernandez.html) vizitis Vitoria-Gasteiz la 9an de decembro. Li estis invitita de la loka grupo de “Izquierda Unida” prelegi kaj deklami pri Miguel Hernández okaze de la cent-jara jubileo pri lia naskiĝo. Tiu-kunktekste li kaptos la ŝancon por prezenti koncize ankaŭ Esperanton.

(Joxemari Sarasua. 07/12/2010)

# KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...

## Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo.




Dum la Paskosemajnfino de vendredo la **22-a ĝis mardo la 26-a de aprilo 2011**, riĉa kultura kleriga kaj turista programo atendas vin en la ĉarma suna ĉemediteranea havenurbo Seto: temas pri la Interasocia Renkontiĝo 2011 de Esperanto ĉe Mediteraneo kunorganizita de pluraj Esperanto-asocioj agantaj en franclingvio.

Al la aranĝo invitas Langvedoka-Rusiljona Federacio aganta per LOKO, t.e., Loka Organiza Komitato. La renkontiĝo okazos en Le Lazaret, komforta feriejo en la urbo Seto ĉe Mediteraneo, kiu provizas multajn dormlokojn, surlokan manĝon, salonegon kaj kunvenejojn. De la jaro 1978 okazas finauguste en «Lazaret » la ISE.

Por vesperoj dancigaj au etosigaj prezentiĝos Jacques Yvart, JoMo kaj Solnishka, Teatro-Trupo de Tuluzo, FaMo, Kapriol', Kaj Tiel Plu. Dominique Gautier prezentos sian filmon pri la Esperanto-movado premiere.

Pliaj informoj kaj aliĝado je http://esperantosete2011.fr

*(Vito Markovo. 09/10/2010)*

## 7-a Iberia Renkontiĝo.

La 7a Iberia Renkontiĝo okazos ĉi-jare en Katalunio la 13an, 14an kaj 15an de majo organizita de Kataluna Esperanto-Asocio kun la subteno kaj kunlaboro de hispanaj kaj portugalaj esperantistoj.

La renkontiĝo okazos en la regiono de Ĝirono. Mojosa ĉenatura gastejo en Sant Andreu Salou gastigos la programon, nutros nin per abunda kaj bongusta manĝo kaj proponos gufujon, trinkejon kaj diskejon. En la ĉefa placo de la apuda urbo Cassà de la Selva okazos nokta koncerto-balo de Kaj Tiel Plu. Dimanĉe ni vizitos Ĝironon kadre de la Tempo de Floroj.

Informoj kaj aliĝo: http://esperanto.cat/ir2011/

*(Ferriol Macip i Bonet. 31/01/2011)*

## 19-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo

Loko: MALGRAT DE MAR (BARCELONA) HISPANUJO
ADRESO: Hotelo. "Cartago Nova***" str. Passeig Maritimo 92
Dato: de la 1-a, ĝis la 8-a de oktobro 2011.
Koresponda adreso:
Luis Serrano Pérez. Apartado 423. E-08200 SABADELL (Barcelona) Hispanio.
Tel. (+34)93 727.50 21. Rete: luis_serrano@ya.com kaj luis_serrano@mixmail.com
http://personales.ya.com/semajno

## Aliaj kongresoj.

| | |
|---|---|
| 14/21 jul. | 67-a Internacia Junulara Kongreso. Hiblivka (apud Kievo). Ukrainio. |
| 23/30 jul. | 96-a Universala Kongreso de Esperanto. Kopenhago. |
| 30 jul./06 aŭg. | 84-a SAT-Kongreso. Sarajevo. |
| 20/27 aŭg. | Itala Kongreso. Torino. |
| Jul. 2012. | 97-a Universala Kongreso. Hanojo (Vjetnamio) |

**H.E.F.**

## **Fundación Esperanto kaj “Caja Navarra”**.

Fundación Esperanto prezentis al ŝparkaso “Caja Navarra” projekton pri E-kursoj. Kaj estis aprobita laŭ la kampanjo "Vi elektas, vi decidas" (la klientoj de Caja Navarra rajtas elekti la destinon de parto el la profitoj kiujn obtenis Caja Navarra pere de la rimedoj de la kliento).

Do, klientoj de tiu ŝparkaso povas elekti kaj apogi la jenan projekton:
N-ro: 22001. Projekto: Cursos de esperanto. Institucio: Fundación Esperanto
http://www.cajanavarra.es/es/tus-derechos/tu-eliges-tu-decides/elige-tus-proyectos/buscador/default.htm?origen=tetd&txt=22001

Krome, se iu ajn malfermas specialan konton kaj estas je la fino de la jaro almenau 20 €, la ŝparkaso donace kaj rekte pagos al Fundación po 10 €. Sed por tio, unue devas esti aprobata de speciala laboristino de CAN.

Projekto: CURSOS DE ESPERANTO

La Fundación Esperanto en su local social ofrece la posibilidad de aprender el idioma internacional esperanto y conocer su espíritu y cultura. El curso es presencial y está abierto de forma gratuita a cualquier persona interesada.

El esperanto se propone como un idioma auxiliar neutral para facilitar la comunicación internacional entre personas de distintas lenguas maternas en un plano de igualdad.

Mesaĝo ricevita la 22an de novembre, 2010:
Hola. Fundación Caja Navarra les informa de que el proyecto Cursos de Esperanto, presentado por la entidad Fundación Esperanto a la iniciativa "Tú eliges: tú decides" de la Banca Cívica cumple con todos los requisitos necesarios. Su número es 22001 y ya está a disposición de ser elegido por los clientes de Caja Navarra durante todo este año 2010. Asimismo, en breve estará visible en nuestra página web (www.can.es). Muchas gracias

*(Informis: Lorenzo Noguero, Sekretario de Fundación E-o. 25/11/2010)*

## **HISPANA E-KONGRESO EN SAN LORENZO DEL ESCORIAL.**

Datoj: de mardo 28ª junio ĝis sabato 2ª julio 2011.
Kongresejo: Kulturdomo de San Lorenzo, situanta en Unua Domo de Metioj, historia konstruaĵo projektita de Juan de Herrera samstile kiel la Monaĥejo.
La partoprenontoj havos eblon ricevi atestilon pri Esperanto laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro, organizata de Universala Esperanto-Asocio kaj Ŝtata Lingvoekzamena Centro de Budapeŝto. Por ricevi plian informon konsultu sekvan paĝon:
http://edukado.net/ekzamenoj/ker
Baldaŭ sekvos pliaj informoj pri la programo, kotizoj kaj aliaj detaloj. Por ajna konsulto aŭ propono por ellabori la definitivan programon, skribu al: info@esperanto.es

*(“NIa Voĉo”, organo de Madrida E-Liceo. Januaro 2011).*

## **PROTOKOLO ESTRARKUNSIDO DE HEF. 2010-11-06.**

1) Decido pri la UK2013 en Madrido: Vidante, ke ne estas tro da intereso el la madrida esperantistaro, HEF ne proponos al UEA organizi en Madrido la UK-on2013.

2) Plibonigo de interna funkciado: La estraro proponos ŝanĝi la agadmanieron de nia Asocio prilaborante pere de "strategiaj planoj" kaj "jaragadplano". La unuaj proponos por ĉiu jar-kvaro grandajn gvidlineojn rilate al la celoj de la Asocio, kaj la duaj proponos jarajn konkretajn agadlineojn; ambaŭ devos esti facile evolu-observadaj kaj taksataj por iom post iom plibonigi la atingon de la celoj de HEF.

Pri "Boletín": n-ro 391 pretas kaj estas en presejo, la redakto-skipo komencis kun la n-ro 392.

Informadiko: Juan Trenado pretis novan administradan informadikan programon, sed por uzi ĝin oni devas unue fari kelkajn provojn per realaj datenoj.

3) Demarŝoj pri HK 2010: Fine de oktobro okazis kunsido de la HK2011-Teamo, kaj la skipo de voluntuloj estas sufiĉe kaj entuziasme bona. Pri la HK2011 HEF mem respondos, pere de la madrida LKK. Komencis demarŝoj por kontakti kun la lokaj aŭtoritatoj de San Lorenzo de El Escorial, kaj krome la kongresejo, la aliaj aferoj ŝajnas jam solvataj. Eĉ oni koplodos organizi la oficialajn ekzamenojn de UEA laŭ la Eŭropa referenkadro, agnoskataj de la Budapeŝta Universitato.

4) Propono pri ŝanĝo de kotizoj por 2012: Oni studos la ebleco ŝanĝi la kotizojn por esperantaj asocioj aliĝataj al HEF, ĉar ekz. estas absurda afero pagigi lokan asocion po 64 eŭroj kiam ĝi konsistas nur el 1 aŭ 2 homoj (reala situacio), kiuj siatempe povas esti HEF-membroj: tio signifas, ke po unu pagas kiel du kotizoj al HEF. Oni pensos pli justa, kvankam komplika, pagmaniero, ĉiam pensante pri la servoj, kiujn HEF devas doni al ilia membraj asocioj.

5) Federaligo: Post la unuaj demarŝoj kun la loka asocio el Valadolido, la rezulto estas nulo. Do, ni ŝanĝos la strategion. Unue ni devas koni la situacion de la asocioj aliĝataj al HEF, kaj oni proponas fari leteran enketon al ili petante informon. Ĝi permesos pli bone koni ilin, kaj proponi konkretan kunlaboradon al ili laŭ necese.
HEJS: nune la junuloj aliĝataj al HEF estas malpli ol 10, do ĉi estas unu el la ĉefaj problemoj por la estonteco de nia Asocio. La kreskado de la nombro de junuloj nepras, kaj ĉiuj strategioj devas priatenti ĉi faro.

6) Aliaj aferoj: Ĉefdelegito de HEF en UEA: UEA sendis leteron petante la nomon de la nuna ĉefdelegito, vere la posteno estas nun malplena. Luis Hernández reprezentis HEF dum UK2010 en Kubo kiel A-Komitatano, sed ĝi estis nur provisora afero. La estraro petos voluntulon.

*(Sekretario de HEF. 12/01/2011)*

## RETPAĜO DE MEL.




Madrida Esperanto-Liceo havas nun propran retpaĝaron, gastigatan en la ĝenerala retejo de Hispana Esperanto-Federacio.

La baza adreso estas http://www.esperanto.es/mel/

Kelkaj el la trajtoj kaj enhavoj estas ankoraŭ provizoraj, kaj do ĉiu ano kaj vizitanto povas fari sugestojn al nia retadreso.

*("Nia Voĉo". Organo de Madrida E-Liceo. Februaro 2011)*

# TRA LA MONDO ...

## Anonco pri Esperanto en “Le Monde”.

Hodiaŭ, en la Zamenhof-tago, aperas en la franca ĵurnalo "Le Monde" 2-paĝa anonco pri Esperanto, financita far la fama japana esperantisto Etsuo Miyoshi.

Ĝi videblas en la Yahoo-arĥivejo de la forumo Esperanto en Bruselo laŭ pdf formato 6 Mb-a; la elŝuto estas iom malrapida:
http://xa.yimg.com/kq/groups/8565888/1895950655/name/10.12.15%20reklamo%202-pagxa.pdf

Dankon pro la atentigo al Francisco Javier Moleón, el Bruselo.


Il y a une solution au problème linguistique
«Une langue nationale n'est pas la réponse. L'espéranto serait une solution non-discriminatoire.»
Les droits linguistiques ne sont pas respectés
Oui au plurilinguisme en Europe
La France mit son veto à la solution
Cette langue s'apprend dix fois plus vite que l'anglais, elle ne connaît pas d'irrégularités ni d'exceptions.


L'Espéranto, ou la réussite d'un certain esprit humaniste
L'Espéranto dans le monde
Petite leçon d'Espéranto

*(Informis Darío Rodríguez. Madrido. 15/12/2010)*

## Pasporta Servo en televido.

Alia mencio al PS en gazetaro, nun en TV. Interese ke la ĵurnalisto iĝis esperantisto pro la raporto.

1-a parto: http://www.youtube.com/watch?v=BTPxDD47Mgg&feature=related
2-a parto: http://www.youtube.com/watch?v=As-Vk2N3yJc
kun subtekstoj en esperanto

*(Informis: Emilio Cid. 15/12/2010)*

## George Soros ĉeestis zamenhofan tagon.

George Soros, la financisto multmilionulo, ĉeestis dum unu horo kaj faris mallongan prelegon en la Zamenhofa Tago de Novjorko 2010.

Kun deko de ĵurnalistoj, deko de universitataj studentoj (pluraj skribantoj pri Esperanto, dum klasaj referaĵoj) , kaj du membroj el unu el la plej famaj familioj en Usono, la familio Soros, la simpozio estis sukcesego. George Soros ĉeestis eble dum horo. Li prelegetis dum 10-15 minutoj. Dum la pliparto de la programo ĉeestis Jonathan Soros, nepo de nia fama Teodoro Soros. Unu universitata studentino profesie filmis la programon sed ŝia kamerao fuŝis dum prelegeto de George Soros. Specialajn dankojn al Isis, Mary kaj Kaŝa por la filmado. Eble mi sukcese filmis dum kelkaj minutoj per simpla fotilo. Humphrey Tonkin donacis la novan eldonon/tradukon de libro de Teodoro Soros al la familio Soros.

*El raporto de Neil Blonstein (transskribo de Henri Masson - Aloisio Sartorato)*

*(Informis: Darío Rodríguez. 16/12/2010)*

## Gustuminda.

*El escritor Fernando Arrabal cree que la ópera es "gastronómicamente erótica, como el esperanto de los paladares", ha explicado con motivo del estreno absoluto en febrero en el Teatro Real de 'Faustball', una ópera con música de Leonardo Balada y de cuyo libreto es autor.*
http://www.heraldo.es/noticias/cultura/fernando_arrabal_opera_gastronomicamente_erotica.html

Ĉu (alia) rilato de esperanto kun F. Arrabal?. Ŝajne jes:
*En los últimos años se han representado en esperanto obras de dramaturgos tan distintos como Goldoni, Ionesco, Shakespeare y Fernando Arrabal.*
http://www.uea.org/info/hispane/ghisdate_hisp.html

*(Lorenzo. 13/01/2011)*

## Du dokumentfilmoj pri Esperanto.

Ni atendis unu profesian dokumentan filmon pri Esperanto en 2011. Ni havos du, unu en la franca, alia en la angla. En ambaŭ kazoj, la reĝisoroj estas jam konataj pro alitemaj dokumentaraj filmoj : la franco Dominique Gautier, kaj la usonano Sam Green, kiu jam parte pritraktis Esperanton en la filmo "**Utopia in Four Movements**" (Utopio en kvar movadoj).

Jam antaŭvidita estis tiu de Dominique Gautier, kies filmadon li komencis en novembro 2009, kaj kies titolo estas ankoraŭ ĝis nun ne elektita (almenaŭ ŝajne; manko de titolo ne faciligas vastan informadon pri ĝi...). Klarigoj pri ĝi aperas ĉe Esperanto-filmo kaj ĉe Filmoj.net.

Pri la filmo de Sam Green, la titolo estas "**The Universal Language**". Sam Green jam filmis eventojn en rilato kun Esperanto, i.a. Universalajn Kongresojn, ekz. en Jokohamo. Li intervuis i.a. profesoron Humphrey Tonkin, kaj la aŭtorinon de la libro "**In the Land of Invented Languages**" (En la lando de inventitaj lingvoj), Arika Okrent. Tre leginda intervuo de Sam Green fare de Chuck Smith, la fondinto de la Esperanto-versio de **Wikipedia**, aperis hieraŭ, 12an de januaro, ĉe **Libera Folio** sub la titolo "Nova dokumenta filmo pri Esperanto ". Aperas en ĝi, ke Sam Green havas pozitivan opinion pri Esperanto. La anglalingva originala versio de la intervjuo aperas kun la subskribo de Chuck Smith sur blogo sub la titolo "Esperanto documentary: The Universal Language".

Espereble aperos nacilingvaj versioj de ambaŭ. Tio estas antaŭvidita almenaŭ por la franca...

*(Darío Rodríguez. 13/01/2011)*

## 140.000 artikoloj en la Esperanto-Vikipedio.

Nur tri tagojn post la 10-jara jubileo de la entuta vikipedio-projekto -en la 15-a de januaro- la Esperanto-vikipedio atingis 140.000 artikolojn, nome vespere de la 18-a de januaro. Nuntempe "nia" versio de la vaste konata internacia projekto enhavas pli ol 30 milionojn da vortoj - simile granda kiel multvolumaj paperaj enciklopedioj. Ĝi aktuale okupas lau la nombro de artikoloj lokon 26 kompare kun alilingvaj versioj de la reta vikipedio. Antaŭ la tempo de interreto kaj rapida internacia kunlaboro oni simple ne povis revi en Esperantujo pri tia projekto - tiel granda kaj tiel rapida: http://eo.wikipedia.org

Pli ol 300.000 rigardoj tage. Ĉiuhore estas proksimume 15.000 rigardoj al paĝo de la Esperanto-vikipedio; per tio Esperanto okupas lokon 38 en komparo kun aliaj lingvoj.

WikiTrans: Automata vikipedio-traduko kun 2,6 milionoj da artikoloj. Multe pli granda ol la Esperanto-vikipedio estas la aŭtomata traduko de la angla vikipedio en Esperanton, kiun preparis la dana entrepreno “GrammarSoft” gvidata de Eckhard Bick. Ĉe http://epo.wikitrans.net/ eblas serĉi en pli ol 2,6 milionoj da artikoloj maŝine tradukitaj, kun nivelo certe ne jam perfekta, sed kun kutime bone komprenebla enhavo.

Ĉu vi ŝatus kunlabori en vikipedio? La artikoloj de WikiTrans taŭgas ankaŭ kiel bazo por kreado de artikoloj en la aktuala vikipedio, se oni volas ĉerpi almenaŭ parton de la enhavo el la angla vikipedio. Se vi volas kunlabori en la granda libera Esperanto-enciklopedio - jen eble bona komenco. Pliaj informoj troviĝas sur la bonveniga paĝo http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Bonvenon_al_la_Vikipedio .

Kelkaj ligiloj:
http://eo.wikipedia.org
http://epo.wikitrans.net
http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias#100_000.2B_articles
http://stats.wikimedia.org/EO/TablesWikipediaEO.htm
http://stats.wikimedia.org/EO/Sitemap.htm

*(Darío Rodríguez. 19/01/2011)*

## **Nova kanalo**.

Jen nova esperanta kanalo dediĉita al amuz(et)aj filmetoj en Youtube:
http://www.youtube.com/user/SvenaDun

*(Miguel Gutiérrez Adúriz. 22/01/2011)*

## **Unua desegnita filmo en Esperanto**.

Unua desegnita filmo en Esperanto: http://vimeo.com/19185725
Kaj la duan vi trovos apude!: cxapeloj@gmail.com

*(Miguel Gutiérrez Adúriz. 01/02/2011)*

## **Ĉesis la elsendoj de Pola Radio**.

Hodiaŭ la prizorganto de la esperantaj elsendoj de Pola Radio, Gabi Kosiarska, aperigis en la blogo "Amikaro de Pola Radio", en Facebook, jenon:

"Karaj Geaskultantoj, Karaj Radioamikoj, hodiaŭ ni havas por vi malĝojigan informon pri foresto de nia E-programo. Nome laŭ la decido de la Estraro de PR ekde hodiaŭ mi ne plu povas okupiĝi pri ili. Ni klopodos baldaŭ liveri al niaj aŭskultantoj kaj amikoj pliajn informojn".

Eblas legi detalojn en Libera Folio: http://www.liberafolio.org/2011/finigis-la-esperanto-elsendoj-de-pola-radio

*(Darío Rodríguez. 03/02/2011)*